



Pli valoras tuj ovo, ol poste bovo.^z

OVUMU KUN NI

FABLO SEN TENDENCO

Koko montras strutovon al la kokinaro:

— Sinjorinoj, mi tute ne volas vin kritiki, mi nur volas montri al vi, kiel oni laboras eksterlande.

G. B. SHAW KAJ OVO

Iu riproĉis la verkiston, ke li skribas pri pentroarto, kvankam li ne kapablas pentri. Shaw respondis:

— Vi pravas! Sed malgraŭ tio, ke mi ne kapablas produkti ovojn, mi tamen scias, kiel ili devas gusti.

ERARO

— Petro, rakontu ion pri virkato — ekpostulis la instruisto ekzamenante ĉu liaj gelemantoj komprenis la ĵus faritan prelegon.

Petro, kiu malatentis la prelegon, ekstaris kaj komencis:

— Virkato estas ... virkato estas dombesto. Ĝi havas lipharojn ... kaj ... kaj ĝi demetas ovojn!

— Terure, infano!? Ĉu virkato fakte demetas ovojn ... ?!

— Ho ve, mi eraris! Pardonu, mi petas! Mi simple intermiksas la virkaton kun la hundo! — klarigis Petro.

(Petar Krstić, Svetozarevo, Jugoslavio)

OVOJ SEN SALO

Gefarmistoj sidis ĉetabele por matenmanĝi. La kamparano komencis per ovo.

— Ĉu vi manĝas ovon sen salo? — demandis mirigita la farmistino.

— Kompreneble — respondis la farmisto kun plena buŝo — se la salo estus bezonata, la kokino ja estus aldoninta da ĝi!

(Hank Beyne, Leiden, Nederlando)


AMO, GEEDZECO KAJ OVO

Amo estas — freŝa ovo.

Geedzeco estas — malmole kuirita ovo.

Eksedz(in)igo estas — disrompita ovo.

(Marija Horĵinek, Petrinja, Jugoslavio)



En la mondo disvastiĝas nova ŝako — sesangula.

Oni delonge provas reformi la klasikan ŝakon. El ĉiuj projektoj plej sukcesis sesangula (heksa) ŝako, kiun inventis poldevena londonano W. Gliński. La nova ludo distingiĝas per multe plia riĉeco kompare kun la ordinara ŝako.

Vojo de la sesangula ŝako al homoj estis longa. Ĝi aperis en 1951, sed nur en 1973 ĝi komencis disvastiĝi. Eĉ BBC-radio disaŭdigis tutmonde pri la neordinara „pola ŝako”. Aperis federacioj de la nova ŝako, plene sendependaj de FIDE.

En 1980 okazis la Unua Eŭropa Ĉampioneco (Londono), kiun paroprenis heksaŝakistoj el Britio, Pollando, Hungario, Aŭstrio. La unua ĉampiono iĝis polo Marek Mackowiak. La dua estis hungaro Laslo Rudolf. Tiam ankaŭ estis organizita Universala Heksagonŝaka Federacio (UHŠF), kaj kiel oficialan lingvon oni akceptis Esperanton.

Post la Eŭropa ĉampioneco estis fonditaj federacioj en Hungario kaj Usono. En Sovetunio oni fondis tutunian klubon „Ĝestj granej”. Okazas internaciaj leterkonkursoj SU—Hungario, SU—Pollando, SU—Ĉeĥoslovakio k. a. En Hungario ekde 1982 okazas internaciaj turniroj „Pokal ‘Alisko’ ”. En 1984 okazis dua Eŭropa ĉampioneco en Hungario. Partoprenis Britio, Pollando, Ĉeĥoslovakio, Sovetunio, Hungario, Jugoslavio, Italio. L. Rudolf venkis, kaj li kun M. Mackowiak estas nun unuaj grandmajstroj de HŠ (heksa ŝako).


La heksan ŝakon ludas ne nur esperantistoj, kaj gvidan rolon en UHŠF ludas ne Esperanto, sed angla lingvo, do esperantistoj-heksaŝakistoj decidis krei propran federacion. Sovietiaj kaj hungaraj heksaŝakistoj fondis Internacian Esperantistan Heksan Ŝakan Klubon — la unuan esperantistan sportan federacion. Prezidanto de IEHŠK estas V. Bujak (Sovetunio), vicprezidanto — I. Nagy (Hungario). IEHŠK reprezentas landon Esperantuĵon en UHŠF, kaj reprezentantoj de Esperantuĵo partoprenos la 1-an mondan ĉampionecon (Londono, 1985).

Aliĝu al IEHŠK — la unua sporta federacio de Esperantuĵo! Skribu al adreso: SU-220050 Minsk, Postamto, Box 27, IEKŠK, al V. Bujak.

La regularon de HŠ vi tralegos en nia „Ovo”.

SESANGULA

ŜAKO



Diagramo 1

La heksan ŝakon oni ludas sur sesangula tabulo, konsistanta el 91 seslateraj fakoj de tri koloroj: blanka, nigra kaj griza. La principoj de movoj kaj celo de la ludo estas samaj kiel en la tradicia ŝako, oni uzas ankaŭ samajn pecojn (kun aldonaj peono kaj kuriero por ĉiu flanko). Ilia dispozicio montras la diagramo 1. Ni rimarku, ke la blanka armeo situas ĉe blanka angulo, kaj nigra armeo – ĉe nigra angulo. Blankan reĝon oni starigas dekstre, la damon – maldekstre.


Ĉirkaŭ la sesangula tabulo estas nombroj (de 1 ĝis 11) kaj literoj (de „a” ĝis „l”, sed sen „j”), kiuj servas por registri partiojn (vidu la diagramon 2). Do situon de la peco sur nigra fakoj en la centra vico ni difinas, trovante eksterajn nombron kaj literon: 8 kaj f, f8.

Do la komencan dispozicion de la pecoj ni povas noti jene: blankaj: Rg1, De1, Tc1, Ti1, Ĉd1, Ĉh1, Kf1, Kf2, Kf3, b1, c2, d3, e4, f5, g4, h3, i2, k1; nigraj: Rg10, De10, Tc8, Ti8, Ĉd9, Ĉh9, Kf11, Kf10, Kf9, b7, c7, d7, e7, g7, h7, f7, i7, k7, kie R signifas reĝon, D – damon, T – turon, Ĉ – ĉevalon, K – kurieron, kaj por peonoj oni uzas nenium literon.


Peono marŝas nur antaŭen sur la plej proksiman fakon (ĉe la unua movo ĝi rajtas antaŭenigi je du fakoj) kaj batas dekstren aŭ maldekstren oblikve. Peono povas bati malamikan peonon, se tiu dum sia movo je du fakoj trairas batatan de ĝi fakon; sed eble bati tiun validas nur post ties movo. Se dum la unua

movo peono batas direkte al la centra kolumno, tiam dum sekva movo ĝi konservas rajton marŝi antaŭen je du fakoj. Kiam peono atingas la kontraŭan limon de la tabulo, ĝi estas ŝanĝenda je dezirata peco.

Turo marŝas en 6 direktoj tiel, kiel estas montrite sur la diagramo 4. Signoj „x” sur la diagramo montras la fakojn, atingeblajn por ĉi tiu peco.



Diagramo 2




Diagramo 4

Kuriero povas ankaŭ elekti unu el ses direktoj de movado, sed ĝi marŝas laŭ la diagonaloj de seslateraj fakoj – tiel, kiel montras la diagramo 5. Ĉiu el la tri kurieroj marŝas do sur samkoloraj fakoj.


Ĉevalo estas unusola peco, kiu povas transsalti aliajn pecojn. La movon de ĉevalo oni povas difini jene: ĝi marŝas je unu fakoj kvazaŭ




Vidpunktoj



Diagramo 5



Diagramo 6



Diagramo 7

ĝi estus kuriero, kaj je unu – kvazaŭ ĝi estus turo, kaj ĉiam ĝi saltas sur alikoloran fakon.

D a m o moviĝas en 12 direktoj, same kiel la turo kaj kuriero. Sur la diagramo 7 ni prezentas ĉiujn fakojn, atingeblajn por la nigra damo, staranta meze de la ŝaktabulo.

R e ĝ o estas la plej grava peco – la celo de la batalo estas ja mati la reĝon de la kontraŭulo. Reĝo, kiel damo, povas moviĝi en 12 direktoj, sed nur je unu fakoj; La movojn de reĝo sur la diagramo 6 montras punktoj.

La heksa ŝako havas ankoraŭ unu diferencon kompare kun la klasika ŝako: la situacio de pato estas konsiderata kiel malvenko. La patita ludanto ricevas 1/4 da poento, lia partnero – 3/4.

Nun vi scias ĉiujn regulojn de la nova „esperantista ŝako” kaj povas jam ludi koresponde.

Dezirantoj ludi koresponde turnu sin al V. Bujak (SU-220050 Minsk, Postamt, Box 27).

Jam de sia infanaĝo Paŭlo konis Lina'n, la filinon de la najbaro. Kiel knabeto li ofte ludis kun ŝi, sed ofte ankaŭ disputis kun ŝi, kiam iu ajn malkonkordaĵo starigis unu kontraŭ la alia. Ju pli ili kreskis, des pli ofte okazis tiaj disputoj inter ili. Iam Paŭlo eĉ vangofrapis la knabinon, kiu foriris plorante. Ekde tiu tago ambaŭ infanoj ĉesis ludi kune. Ili estis dekdujaraj, kio ja estas la plej maloportuna aĝo por la rilatoj inter geknaboj. Dekdujaruloj kutime malestimas samaĝajn knabinojn, kiujn ili opinias stultaj, ne konsciante pri sia propra stulteco!

Sed ankaŭ tiam disiĝis la geknaboj, ĉar Paŭlo forlasis la urbon por iri al gimnazio en apuda urbo, kie li studis kiel interna lernanto dum kelkaj jaroj. Nur la dimanĉojn li pasigis en la gepatra domo, kaj ofte la farendaj taskoj por la lernejo ne ebligis al li eliri al la strato. Tiel li ne plu havis okazon revidi la iaman ludkunulinon.

Iam li tamen faris promenon, ĉar belega printempa vetero allogis lin eksteren en la naturon. La suno kvazaŭ sorĉe plibeligis la ĉirkaŭaĵon de la urbeto, kaj la junulo (li nun estis deksejara) plenkulme spiris la vivigantan aeron kaj sentis sin plene feliĉa. Tiam li renkontis belan knabinon, kiun li unue ne rekonis. Ŝi estis Lina, la filino de la najbaro, kiun li preskaŭ forgesis. Nerekonebla ŝi estis nun: la jama knabeto fariĝis rava junulino kun belaj okuloj, longaj blondaj haroj kaj svelta fleksa talio. Tia beleco impresis al Paŭlo, kiu ruĝiĝis kaj eksentis fortan batadon de sia koro. Post momento li tamen rekonis ŝin kaj salutis ŝin kun rideto. „Estas vi, Lina? Mi hezitis rekonii vin ... pro via nova haraĝo.” – „Kiel vi fartas, Paŭlo? Mi tuj rekonis vin, ĉar vi restis ĉiam la sama!” Certe, kiam knabo fariĝas junulo, li malpli ŝanĝiĝas ol knabino, kiu viriniĝas. La metamorfozo de Lina ravis Paŭlon, kiu malkovris novan personon, plaĉaspektan, admirindan, eĉ amindan! La detalo, kiu plej impresis al Paŭlo, estis la brusto de Lina, kiu nerezisteble allogis liajn rigardojn, el sub la maldika ŝtofo de la freskolora printempa robo.

Paŭlo kaj Lina daŭrigis sian promenon kune, amike babilante, kaj la dolĉa voĉo de Lina estis por la knabo plia allogaĵo, kiu ekflamigis lian koron. Kiel malproksima estis la vangofrapo, kiun la bubo donis al la knabino! Anstataŭ frapi tiun freŝan vangon, Paŭlo pli volonte kisis ĝin! Kio do okazis al Paŭlo, ĉu amo, deziro? Li mem ne kapablus distingi tion. Sed li sentis sin feliĉa, kiel neniam antaŭe!

Post tuta horo da promenado kaj amika babilado, Paŭlo kaj Lina revenis ĉiu al la propra hejmo.

Sed la bildo de Lina ne forlasis Paŭlon, kiu de nun daŭre pensis pri la ĉarma silueto. Enlitiginte, li ne kapablus ekdormi kaj la pensado pri la belulino obsedis lin ĝis malfrua horo de la nokto. La vizaĝo kun la bluaj okuloj, la abundaj blondaj haroj, la rideto de Lina kaj ĉefe la brusto de lia amikino restis obstine en lia memoro. Precipe la penso pri ĉi-lastata parto de la dezirinda korpo daŭre okupis lian menson. Dum sia maldormo, li klopodis imagi ŝiajn mamojn nudaj kaj revis, ke li arde, ambaŭmane karesas ilin. Tiuj sentoj estis tute novaj por Paŭlo. Sed nur la duondorma stato, en kiu troviĝis Paŭlo, ebligis ĉe li tian senbridigon de liaj pensoj. Lia timida naturo estis, en la normala vivo, sufiĉa bremsilo por eviti skandalan konduton. Paŭlo estis serioza knabo kaj liaj revoj tute ne riskis iĝi realaĵo!

Post la promenado, Paŭlo estis proponinta al Lina novan renkontiĝon kaj ŝi volonte akceptis. Jam la morgaŭan tagon ili retrovis unu la alian kaj denove promenadis en la kamparo. Tiaj promenadoj okazis ĉiutage kaj ege feliĉigis Paŭlon, kiu trovis sian amikinon pli kaj pli bela kaj ĝuis sian apudeston.

Sed iun tagon pluvis, kaj tio malebligis la kutiman promenadon de la gejunuloj. Tiam Paŭlo proponis al Lina veni al li por rigardi liajn fotojn. Lina akceptis kaj la knabo venigis ŝin al sia ĉambro. Ambaŭ sidigis ĉe la tablo kaj rigardis la fotojn, kiujn Paŭlo faris, kun bona amatora talento. Ili sidis apude kaj Paŭlo enma-

nigis al Lina, unu post la alia, la fotojn, kiujn li iam faris. La knabino admiris ilin kaj komentis, petis klarigojn. La gejunuloj sidis ŝultron ĉe ŝultron, kapon ĉe kapo, kaj tio kvazaŭ ebrigis Paŭlon, kiu sentis la varmon de la junulina korpo. Lia rigardo plonĝis en la dekoltaĵon de Lina, glitis sub la robon, inter la mamojn de la knabino, tiuj mamoj, kiuj tiom ekscitis lian deziron! Tiu vidaĵo subite mutigis lin, kaj Lina, kiu ĵus faris al li demandon, rimarkinte, ke li ne respondas, turnis la kapon al li kaj vidis tiam, ke li ĝapas al ŝia brusto. Tiam ŝi ekrugiĝis pro kolerio kaj fortege vangofrapis Paŭlon. Ambaŭ ekstaris, Paŭlo konfuzite kaj Lina furioze, kaj ŝi decidpaŝe forlasis la ĉambron kaj la domon de Paŭlo.

Post tiu skandalo, la du gejunuloj ne plu renkontiĝis.

* * *

Tiel frakasiĝis, subite, la feliĉo

de Paŭlo. Li nun konsciis, ke li fuŝis ĉion kaj amare riproĉis al si sian konduton, kiu bedaŭrinde metis finan punkton al la plej ĉarma idilio. Ho ve! Tro malfrue! Li devis rezigni pri la amo de Lina, sed tio, kion li sentis al ŝi, ne formortis kaj li ekkonis la turmenton de la rimorso. Li fariĝis malĝoja kaj havis la certecon, ke li neniam pli amos alian knabinon ol Linan, kies bildo plenigis lian tutan koron. Kaj tiu amo al ŝi iĝis tiom pli ekskluziva, ke ĝi nun estas neebbla, nereciproka.

Intertempe lia familio translokiĝis al alia urbo. Tiel li ne plu vidis Linan, kaj preferis tion, ĉar renkonti sian amatinon (ĉar li ja ĉiam amadis ŝin!) ŝajnigantan ne koni lin, estis por lia amanta koro kruela turmento.

Pasis kelkaj monatoj. Certe li ne forgesis ŝin, sed tamen ŝia bildo iom nebuliĝis en lia memoro. Dum somerferioj li akompanis la gepatrojn al la marbordo por unumonata restado. Tuj

post la alveno, li iris al la plaĝo por bani sin kaj sunumi. Ĉar li dum multaj jaroj ne feris ĉe la marbordo, surprizis lin la nova modo de la virinoj, kiuj surhavis nur minimuman bankostumon, kiel la viroj, kaj elmetis siajn nudajn brustojn al la sunradioj kaj samokaze al la rigardoj de ĉiuj. Komence tio iom ŝokis lin kaj li eĉ ne kuragiĝis rigardi. Tamen, vidante neniun ĝenon sur la vizaĝoj de tiuj najadoj, li iom post iom aŭdacigis kaj rigardis tiun edenan spektaklon, tute novan por li. Liaj okuloj flirtis papilie de unu brusto al alia kaj li konstatis diferencojn inter tiuj de mezaĝaj matronoj kaj tiuj de pli junaj virinoj aŭ freŝaj junulinoj. Liaj rigardoj restadis pli longe sur ĉi-lastaj kaj tiu vidaĵo donis al li veran ĝojon.

Vidante la indiferecon, kun kiu tiuj inoj lasis rigardi siajn mamojn de kiuj ajn nekonatoj, li subite repensis pri la sceno kun Lina, kiu rompis ĉiujn rilatojn kun li pro nura rigardo sub ŝian robon. Tiu penso pri la perdita feliĉo redolorigis lian koron.


Sed jen li ekvidis iun belan knabinon sidantan sur la sablo. Ŝi estis pli bela ol ĉiuj, kiujn li vidis ĝis nun kaj ŝia brusto estis perfekta. Ĉe tiu vido freneze ekbategadis lia koro, ĉar li subite rekonis ŝin! Jes, estis Lina! Tiu sama knabino, kiu tiel koleriĝis pro nura ekrigardo al ŝia sino, nun elmontris sian preskaŭ tutan korpon sub la somera suno kaj centoj da homoj povis admiri ŝian radiantan belecon! Unuafoje Paŭlo povis vidi la belformajn kaj firmajn mamojn de sia iama amikino, jam sunbrunigitajn!

Lia konfuzo estis granda kaj li ne sciis, kion fari. Kia estos ŝia reago, kiam ŝi vidos, ke li rigardas ŝin? La sango kolorigis lian vizaĝon kaj li ek-sentis la emon forkuri el la plaĝo kaj neniam plu reveni!

Sed tujmomente Lina turnis la kapon kaj ekvidis lin. Granda surpriziĝo aperis unue sur ŝia vizaĝo, sed baldaŭ ekfloris bela rideto sur ŝiaj lipoj kaj ŝi diris: „Paŭlo, estas vi? Kia ĝojo revidi vin ĉi tie!” Kaj tion dirante, ŝi levigis kaj alpaŝis al Paŭlo kun etendita mano. Ambaŭ gejunuloj manpremis reciproke, sed en ŝia ĝojo revidi Paŭlon, Lina eĉ kisis lin survange. Tio estis ŝia unua kiso al li. Dum ŝi kisis lin, ŝia mamu tuŝis la bruston de Paŭlo, kiu en ŝia embaraso restis muta kaj eĉ ne pensis kisi ŝin. Rimarkinte tiun sintenon, Lina memoris pri la lasta sceno inter ili. „Jes, Paŭlo, mi komprenas. Mi vere stulte agis tiam. Vi devas pardoni al mi, ĉar vi certe suferis pro mi. Tion mi sincere bedaŭras. Nu, kara Paŭlo, ni denove estu geamikoj kaj ni restu. Malprave mi tiam ne akceptis la omagon de via rigardo. Nun mi komprenas,

ke vi ne havis malpuran intencon. Ankaŭ vi plaĉas al mi, ĉar vi estas bela knabo. Ni ne fuŝu nian feliĉon! Ĉu vi deziras nun bani vin kun mi?”

Kaj preninte la brakon de Paŭlo, ŝi iris kun li en la maron kaj baldaŭ ili naĝis kune, kiel la plej bonaj geamikoj en la mondo.



Fotis I. Spoljarec

FOLKFESTA KANTO

PRI INSTRUISTO DE ESPERANTO


La sekstona ĉielis de

Tomáš Pumpy

kaj desegnoj miĉka Tomečkova

Nun sekvas kanto
kun moral-inslsto
pri Esperanto
kaj ĉe-instruisto

Lin ja formangis
nigraj kanibaloj
sed sin ne ŝangis
liaj idealoj.



Vivis foje vir' en urbo Prago,
Sigismundo estis lia nom.
Li dediĉis sin en unu tago
al la Esperanto-Idiom.

Li ellernis ĉiun vortradikon,
malgraŭ granda peno kaj klopo
elparkeris Plenan gramatikon
kaj aliĝis al la ĉe-metod.



Por dissemi ĉie novan senton,
ne sufiĉis al li propra land'.




Li elektis nigran kontinenton
por grandskala verda propagand'.



Li pilgrimi devis sur kamelo
en dezerta sablo de Sahar'
ĝis li fine venis al la celo
en la indigena praarbar.
Ho ve, kial la Fortun fatala
antau morto ne avizis lin?
Ĉar sovaĝa gento kanibala
en la praarbar' surprizis lin.

Ili kaptis lin kaj en vilaĝon
trenis lin sur malfeliĉa voj',
kaj ili metis lin en bambuan kaĝon,
estis vane plori: ho ve, oj!



Ili volis laŭ kutim' afrika
kaj konata kanibala mor'
lin grasigi kaj nutri lin dika,
poste buĉi lin kaj mangi far.
Tamen tion ili ne atendis,
ke ne mangos la esperantist',
vane ili bongustaĵojn sendis,
li surprizis ilin per rezist'.



Tio estis tre, tre malagraba,
 ĉar pro larmoj kaj melankoli
 li maldika iĝis, iĝis magra
 kaj malgrasa iĝis en tali'.

"Kial, viro, vi ne ĉesas larmi?"
 demandis lin la ĉefkanibal,
 "Ĉar ne povis realigi, al mi
 mia Esperanto-ideal'.

Mi ne timis tra la maro vadi
 por alveni fine al la cel':
 Esperanton al vi instruadi
 kaj vin varbi por la Verda stel'.



"Nu, atendu iom en la kaĝo"
 petis lin la kanibala ĉef'.
 "Ke ne estu vana la vojaĝo,
 realiĝos via vivo-rev'.

Kaj nun ĉio sin komencis ŝanĝi,
 ĉesis larmoj, ĉesis ve, ho ve!
 ĉar li rajtis kurson ekarangi
 laŭ metodo de Andreo Ĉe.

Elegante, forte, kun kuraĝo
 lernis tuta kanibala gent'.
 Instruisto sidis en la kaĝo
 kaj instruis kun temperament'.

Lia klaso montris sin talenta
 kaj li post la deka leciono
 estis dika, estis korpulenta,
 kaj rondforma kiel la melon'.



MI DEZIRAS BONAN
 APETITON!

estis lia adiaŭa fraz'.
 Kaj ili komencis sian riton
 preparante spicon por kulbas'.

Tia estis lasta leciono,
 tia estis lia vivo-fin' ...
 Ili lin kuiris en kaldrono
 kaj distrancis kaj formangis lin

Lian koron ili semis plante
 laŭ la pet' de lia testament'.
 Kaj ĉirkaŭe kantis Esperante
 pri frateco kaj pri nova sent'.



ILI KAPTIS ELZANI!

LA MIRINDAJ OKULOJ

„Sinjoro, mi ĵus eliris el la hospitalo, kaj al la oficejo tuj venis. Mi ne havis tempon. Ĉu vere vi deziras, ke ...?”

„Kompreneble. Vi aŭdis min, ĉu ne?, kiam mi vizitis vin en tiu terura loko. Vi jam perdis tempon venante oficejon. Iru tuj!”

Johano rapidis for, sed – ĉar li estis singarda – antaŭe petis s-ro Pipelbom subskribi paperon, en kiu estis dirite, ke Johano reprezentas la konatan industriiston en ties edzinserĉado. Ne taŭgas, ke la homoj en la agentejo malfidu lin. Plena je memfido, kaj scivolema, li eniris en ties oficejon.

„Ĉu tiaj estasĵoj envere ekzistas?” demandis al si Diana Belpar, admirante la belulon, kiu ĵus envenis.

Johano ja estis alta junulo, brunhara, blu-okula, kun kortuŝa vizaĝo kaj rideto kapabla igi iun ajn knabinon sekvi lin ĝis la mezo de Saharo. Krome, io tre simpla en lia sinteno tuj sentigis, ke li ne rigardas sin supera al la homoj, kiuj ne havas la feliĉon esti same bele kunmetitaj. Kaj tuj simpleco igis lin eĉ pli altira.

„Ĉu tiaj estaĵoj ekzistas envere?” li pensis sammomente. Li antaŭe opiniis, ke tia beleco ekzistas nur en filmoj. Lia koro batis forte. Li sentis, ke jam li komencas enamigi al ŝi.

„Mi ne venas propranome”, li ekparolis, apenaŭ elportante la kortuŝan povon de tiuj mirindaj okuloj. (Li sentis timete, ke li preskaŭ povus ruĝigi, maloftega okazaĵo ĉe li).

„Je kies nomo vi do venas?” muzikvoĉis la kisinda buŝo.

„Jen,” Johano respondis, kaj li transdonis la rajtigilon subskribitan de s-ro Pipelbom. Diana Belpar ĝin legis atente.

„Mi estas la sekretario de s-ro Pipelbom,” la junulo diris, tuj kiam ŝi finis la legadon, „kaj li petis min veni ĉi tien por prezenti lian deziron.

Ĉar li estas tre vaste konata homo, mi opiniis, ke estus saĝe peti de li ion subskribitan. Sen ĝi, vi eble imagus, ke temas pri ŝerco!”

„Efektive,” Diana respondis.

Tiu dokumento surprizigis ŝin. Male al Cipriano, kiu disradiis seriozecon per la tuta estmaniero, ĉi tiu agrabla junulo povus esti, ekzemple, studento fi-ŝercema.

LA DEZIRO

„Kio precize estas lia deziro?” ŝi demandis.

„Li estas kvindekjara, tre riĉa. Li tiris neimageblan riĉon el diversaj produktoj, el kiuj unu el la plej novaj estas tabako sentabaka, pri kiu vi certe aŭdis, ĉu ne?”

„Jes. Tiu produkto ebligas al homoj fumi kun la sama plezuro, kvazaŭ estus tabako, sed sen ties malbonaj efikoj al la sano.”

„Guste. Nu, li estas tre riĉa, kaj nun volas edziĝi. Sed li ne deziras junulinon, kiu akceptus lin por la mono. Li esperas trovi pli malpli kvindekjaran virinon, sufiĉe monhavan, kapablan paroli interese pri plej malsamaj temoj, bonfartan, ŝatantan bone manĝi kaj trinki, kaj ankaŭ vojaĝi. Vi vidas. Li tute ne zorgas pri tio, ĉu ŝi estas bela aŭ ne. Li bezonas kunulinon, kun kiu li povus vojaĝi kaj diskuti pri ĉio.”

„Dankon, sinjoro. Vi donis al mi sufiĉe precizan bildon pri tio, kion via mastro deziras. Mi tre ĝojas: tio faciligos mian taskon. Ĉu mi kontaktu lin, aŭ vin, kiam mi povos sciigi la nomojn de interesaj eblulinoj?”

„Min, kompreneble. Li havas tre multe por fari kaj ne havas tempon por prizorgi mem la aferon. Li havas planan fidon al mi, kaj scias, ke konante lin tre bone, mi prezentos al li nur personojn, kiuj vere respondas al lia deziro.”

Dum la senvorta momento, kiu sekvis, Johano direktis al Diana

sentoplenan rigardon.

LA INVITO

„Mi ... mi ... mi ne dubas, ke vi sukcese aranĝos la aferon. Eeee...”

Ŝi estis notanta ion, sed lia subita sin-interrompo igis ŝin levi la okulojn al li.

„Ĉu s-ino, aŭ f-ino Belpar?” li demandis, iom singene.

„Mi ne ŝatas tiujn vortojn, sed se vi volas scii, ĉu mi estas edzino, la respondo estas: ne. Mi eĉ ne havas vivkunulon. Mi estas libera, kaj tre alte taksas mian liberecon.”

„Se vi estas libera, ĉu mi povas inviti vin al vespermanĝo hodiaŭ?”

Ŝi ridetis.

„Mi ne estas tiel absolute libera. Ne. Por ĉi tiu vespero mi planis ion alian, sed mi estos libera morgaŭ, kaj tute konsentos uzi tiun liberan tempon kun vi, se taŭgos ankaŭ morgaŭ.”

„Taŭgos. Kaj estos por mi granda ĝojo. Ĉu mi venu ĉi tien?”

„Ne. Mi iros al mia apartamento por igi min bela. Mi tie atendos vin je la ... ĉu la oka? Jen mia adreso. Ej! Ne foriru,” ŝi krietis, vidante lin ekstari kaj turni sin al la pordo. „La servoj de tiu ĉi agentejo ne estas senpagaj. Mi devas klarigi la monan aspekton de nia aranĝo, kaj la interkonsenton vi devos subskribi.”

LA DECIDO

En sia vasta oficejo, plej moderne meblita, s-ro Pipelbom sidis en brakseĝo kaj pensis. Li rondrigardis sian oficejon. Li ŝatis ĝin. Ĝi estis vasta, riĉmontra kaj komforta: ĝi signis potencon.


Li pensis pri sia domo. Jes, li ŝatis ankaŭ sian domon, pro la samaj motivoj, kaj la tuta bieno ĉirkaŭ ĝi. Sed nun ... Ekkolero kaptis lin. Tiuj diablaj socialistoj ... Estis hontinde, fari tion al li. Forpreni eron el lia potenco. Kiel eblas? Kaj tamen ... ! Li sciis, ke ili estos pli fortaj. Eĉ lia tuta mono ne povos ŝanĝi ilian nekredeblan decidon, en la nuna politika situacio. Edziĝo, siaflanke ...

Dum, videble, li profunde pensadis, Johano lin rigardis, respekte atendantanta. Li konis sian mastron. Li vidis, ke decido formiĝas en lia menso. Ne necesos multa tempo, por ke li konu ĝin.

„La respondo estas jesa,” la mastro fine deklaris kun la solena voĉo de prezidanto leganta al la kunsidantoj la rezulton de voĉdonado. „Mi edziĝos al la grafino de-Montokalva.” Kaj li silentis.

(daŭrigo en la sekva numero)

ZMIKI



ZMIKI



ZMIKI




ZMIKI



© 1985 ZMIKI & CO. © 1985 IVEZIC

Elena DELEHAYE

OVOJ EL ITALIO



„Esti senhara kiel ovo” signifas esti kalva.



„Renversi la ovaĵon”. Ĉi tiu dirmaniero signifas falsi paroladon aŭ situacion por persona avantaĝo.



„Serĉi la haron en la ovo” signifas saĝumi, serĉi la minimumajn mankojn.

TIAL NI ESTAS ĈI TIE

Televida agentejo CBS en Usono filmis dokumentan filmon pri sporta vivo en iu malliberejo. Jam sufiĉe multe ili filmadis kiam iu el la filmistoj rimarkis ke io ne estas en ordo: ĉiu skipo havis po 13 ludantojn. „Sed vi havas po dektri ludantojn anstataŭ dekunu laŭregule” – ek-kriis la filmisto. „Jes ja, tial ni estas ĉi tie – ni ja trompadas!” – klarigis iu el la malliberuloj.

INTERKRUCIGO

Ĉu vi scias, ke ornitologoj sukcesis interkrucigi kolombon leterportiston kun pego? Kaj kio estis la rezulto? Kolombo leterportisto, kiu regule frapas al la pordoj.

NOVJORKA SEKURECO


Nuntempe en Novjorko preskaŭ ĉiuj loĝejoj havas 6 aŭ 7 serurojn. Sed, tamen, tio ne malgrandigis la nombron de ŝteloj. La seruristoj nun inventis bonan konsilon: Duonon de tiuj seruroj oni ne ŝlosu! Temas, nome pri la jeno: La ŝtelistoj okupigantaj pri la seruroj malfermos la ŝlositajn serurojn, sed la neŝlositajn ili ŝlosfermos.

KOMUNA VENENIĜO

Iu ŝtalfabrika en franca regiono Alsac-Lorein restis certatempe sen sesdek laboristoj. Ili kolektive veneniĝis dum solena vespermanĝo per kiu ili festis unu jaron sen iu ajn akcidento en la laboro.

NEPALANOJ KAJ FUMADO

En Nepalo, kie loĝas 15 milionoj da homoj, 79 procentoj de la viroj kaj 58 procentoj de la virinoj estas fumantoj. Tion eldiris nepala specialisto por koraj malsanoj, doktoro Mirigende Raj Pandej. Laŭ li, la fumado estas unu el la plej gravaj kaŭzoj de la koraj malsanoj. Nepalo okupas unu el la ĉefaj lokoj en la mondo koncerne tiujn malsanojn.



„Rompi la ovojn en la korbo al iu” signifas malorganizi la malproprajn planojn.




KAŜLUDO

Trovu almenaŭ 5 diferencojn inter la bildoj A kaj B.

Aŭtoro: Ĝ. Janĉi



REBUSO desegno Ĝuro Janĉi
ideo J. Pleadin

NA CIA NA   

O=A UR=V



Hong Kong Student Travel Ltd., 8/F Tai Sang Building, 130-132 Des Voeux Road, Central, Hong Kong, ofertas al vi:

El Hong Kong ĝis:	Prezo de revenbileto (en HK dolaroj)
Ateno	4.840.-
Frankfurto	4.840.-
Londono	6.550.-
Madrido	7.000.-
Munkeno	8.792.-
Parizo	4.840.-
Romo	4.840.-

* (1 usona dolaro = ĉirkaŭ 9 HK dolaroj)

INTERNACIA HELPO

Sendu al mi ion ajn (krom konsiloj, mi petas!) kontraŭ la fumado. Kun koraj antaŭdankoj – Carol Szász, R-4174 Praid nr. 130, Jud. Harghita, Rumanio.

Jen mia propono por ĝeni la fumantojn kaj eble helpi ilin ĉesi la fumadon: Sekreta kaj daŭra puntepren(ad)o de la cigaredoj de la celita fumanto, respektive – enŝovi kelkajn harojn en ĉiun cigaredon. Ĉevalharoj funkcias bone, ĉar ili estas sufiĉe fortikaj kaj oni povas enŝovi ilin. La odoro kaj la gusto certe ĝenos la fumanton, kaj se la fumant(in)o daŭrigas fumi, verŝajne negrave malsaniĝos. Kompreneble, oni devas zorge enŝovi la harojn, tiel ke ili estas kaj restas nevideblaj. Tio funkcias nur por la aĉetitaj cigaredoj. Se oni mem faras la cigaredojn, la haroj devas esti enmetitaj dum la farado – Joel Brozovsky, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.

Por niaj tradiciaj interpacaj ekspozicioj ni bezonas (kaj daŭre kolektas) ĉiulandajn kaj ĉiulingvajn porpacajn afiŝojn, flugfoliojn, leterojn, fotojn, (infan)desegnaĵojn, librojn, revuojn, ĵurnalojn, lumbildojn, insignojn, gluvinjetojn, poŝtmarkojn ... kaj ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn.

Respondo kaj laŭdezira rekompenco garantiitaj! Tiu ĉi alvoko validas ĉjam. Represo kaj nacilingvaj anonctradukoj petataj. Anticipan dankon al ĉiuj kontribuantoj! – Interklubo „ESPERANTO”, Glavpoĉtamt abon. ja. 76. SU-703000 Samarkand. Uzbekistano, USSR.

ga, ga ...

Finfine mi povas centprocente pruvi ke nia ĉefredaktoro malŝatas min, kaj intence malebligas la evoluon de mia internacia kariero. Li ne permesis al mi aperigi en „Ovo” mian genian verkon: recenzo de nova esperantlingva romano. Ĉiujn miajn pruvojn ke mi kapablas skribi ĉion – aparte bonajn recenzojn – li eĉ ne volis aŭdi.

– Ni ne estas literatura gazeto – diris li.

– Jes, sed ni estas esperantlingva gazeto – respondis mi – kaj ĉu vi iam vidis esperantlingvan gazeton sen rubriko, kie ni literaturfakuloj neniam skribintaj iun verkon, recenzas novaperigitajn librojn ...

– Sed, vi okupiĝas pri la klaĉoj el Esperantujo kaj ne pri literaturo ...

– Jes, ĝuste pro tio. Ĉe ni recenzoj estas firme ligitaj al klaĉoj. Sen scii la aktualajn klaĉojn pri iu aŭtoro, oni, mia opinie, ne povas skribi kvalitan recenzon. Se vi ne kredas al mi, demandu dekojn da aliaj recenzantoj en nia tutmonda amika esperantista movado ...

– Do bone, vi preskaŭ konvinkis min, sed pri kia libro vi volas skribi?

– Mi recenzis modernan romanon pri amo.

– Vi, pri amo? Kion vi scias pri amo? Unue vi jam estas sufiĉe maljuna, kaj due, mi kredas ke krom via propra patrino neniam iu amis vin pro via babilemo, kaj via vantemo.

– Kion? Kion vi diras? ... Vi, stulta redaktoro – laŭte ekgakis mi – Ĉu vi ne aŭdis ke iam, antaŭ 40 jaroj, mi amindumis kun tre bonaspekta esperantisto. Li eĉ ne estis simpla esperantisto, li estis fama esperantisto – prezidanto de nia grego, eĉ prezidanto de nia tuta bestaro, ĉefulo en nia ĝardeno!!!

– Do, bone, bone, nur silentigu vian malbenitan voĉon, miaj oreloj jam doloras – diris mia redaktoro – Sed ĉu vi entute povas imagi kiel devus aspekti bona recenzo, kiel oni verku ĝin ...

– Verki recenzon ne estas problemoj! Gravas nur ke ĉiu recenzanto vidu la libron. Tiam oni jam povas multe skribi pri ĝi. Nepre mi skribas ĉu la libro estas bone aŭ malbone bindita. Ĉu ĝia formato estas taŭga por miaj manoj. Poste mi priskribas la koloron de la kovrilpaĝoj, la formon de la literoj ... Multaj libroj enhavas ankaŭ foton de la aŭtoro. Tio por mi estas granda ĝojo, ĉar kiam mi vidas la foton mi povas pripensi ĉu mi la aŭtoron konas aŭ ne. Depende de tio,

„OVO”
INTERNACIA ĜAZETO POR DISTRO
KAJ AMUZO
Aperas 15 foje jare.

ELDONAS: Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio.
KONSILANTARO: Ljerka Begić, Zlata Cundeković, Đorđe (Gorĝe) Dragojlović, Gordana Plavšić, Slavko Šimunić, Ivica Špoljarec, Spomenka Štimec.

REDAKCIO: Milena Grgić, Jozo Marević, Nikola Rašić, Slavko Šimunić (ĉefa kaj respondeca redaktoro), Ivica Špoljarec (grafika kaj teknika aranĝo), Zlatko Tišljar, David, Rey.

ADRESO: „OVO”, Kroatia Esperanto-Ligo, Amruŝeva 5/1, 41000 Zagreb, Jugoslavio, tel. (041) 424-660.

PRESAS: Srednja ŝola tiska in papirja, Ljubljana, Jugoslavio.

PREZO de unu ekzemplero: 3 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 60.- din.

JARABONO: 35 guldenoj (aŭ egalvaloro), por Jugoslavio 700.- din.; validas por 15 numeroj ekde la momento de la enpago.

PAGU per poŝtpagilo al la adreso de la eldonanto aŭ al la perantoj.

PERANTOJ

BELGIO: Eldonejo „Sonorilo”, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk kaj Flandra Esperanto-Ligo, Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen

BRAZILO: „Fonto”, Caixa Postal 49, BR-89800 Chapeco, S. C.

BRITIO: Brita Esperanto-Asocio, 140 Holland Park Avenue, London W11 4UF

FRANCIO: Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris

FR GERMANIO: Esperanto-Centro, Postfako 1450, D-4790 Paderborn

KANADO kaj USONO: Zdravka Metz-Fleury, 6358 de Bordeaux, Montréal, Québ. H2G 2R8

NEDERLANDO: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

SVEDIO: Eldona Societo Esperanto, Box 7502, S-200 42 Malmö

SVISLANDO: Jadranka Zadro-Mikulčić, Via Tabio 5, CH-6500 Bellinzona

la recenzo estos bona aŭ malbona. Ekzistas multaj saĝaj aŭtoroj kiuj ĉiam evitas konfliktojn, tiel al ili mankas malamikoj. Pri ili mi ne povas multe skribi, sed, tiam mi devas bone trarigardi iliajn vizagojn, hararangon, vestaĵojn ... Al tiuj detaloj mi ankaŭ dediĉas gravan parton en mia recenzo ... kaj poste mi devas pensi pri ilia vivmaniero, kaj ...


– Iru al diablo, – nervozigis la redaktoro – vi nur babilas kaj babilas. Ĉu vi entute kutimas skribi ankaŭ ion pri la libro mem?

– Klare ke jes, se al mi restas sufiĉe da spaco ... Tiam mi estas vere objektiva, iom pika sed miamaniere objektiva. Mia stilo estas pika kaj akra. Mi ŝategas tiam ludi per pikaj vortoj. Tio vere ĝojigas min, ĉar tiam ĉiu leganto povas vidi kia genia persono mi estas. Nome, mi skribas recenzojn nur por montri al la legantoj kiel genia kaj skribkapabla ansero mi estas. Mi deziras montri mian eksterordinaran geniecon ...

Dirante tion, mi faris grandan eraron, ĉar ĉiu ĵurnalisto devus scii ke nur la artikoloj de redaktoroj estas geniaĵoj. Nur la ĉefredaktoroj estas geniaj personoj, kiuj ne toleras aliajn geniaĵojn en sia gazeto.

LA KASTELO DE LA OVO

En la itala urbo Napolo (Napoli) troviĝas „la kastelo de la Ovo”. Vere! La bildkarto kiun sendis al ni Elena Delehaye el Napolo estas la pruvo ke ne temas pri ŝerco. La kastelo, bedaŭrinde, ne estas posedaĵo de nia „Ovo”, sed ... por imagi kaj revii, la foto sufiĉas.



KONKURSO!

SENDU AL NIA REDAKCIO ĈION KIO ESTAS LIGITA KUN OVO KAJ OVUMADO.

Ekzemple: ŝercojn, karikaturojn, fotojn, poemojn, rakontetojn, rebusojn, proverbojn, receptojn pri ovomangoj ktp., aŭ ion pri la sciencaj esploroj pri ovoj, pri ovo en diversaj lingvoj, pri la rolo de ovoj en la homa historio, pri la specoj de ovoj, do, pri ĉio ajn ligita kun ovo.


Vi povas sendi ion kion vi mem elpensis aŭ verkis, ion kion vi ie vidis, tra legis, pruntis aŭ ŝtelis.

Sur la paĝoj de OVO ni aperigados viajn kontribuojn kaj premiojn la plej kvalitatajn.

Jen nia adreso:
Kroatia Esperanto-Ligo
(„OVO”-konkurso)
Amruŝeva 5/I
YU-41000 Zagreb

FOTO

Ekzistas neimageble multe da homaj vizaĝoj, loĝlokoj, pejzaĝoj kaj vivsituaĵoj dise tra la mondo. Neniu el ni, en sia vivo, havos okazon vidi ĉiujn ekzistantajn belaĵojn, ĉeesti ĉiujn okazaĵojn kaj renkonti ĉiujn homojn, sed ĉiu el ni posedas la parteton de la tuto. Ni deziras ke pere de fotoj, en tiu ĉi rubriko ni interŝanĝu niajn bildajn posedaĵojn; simple por pli senti la kunestadon kaj por pligrandigi nian konon pri la mondo. Al ĉiu foto kiun vi sendas aldonu mallongan priskribon.



„JARAGOJ
Fotis: Maša Rujička